ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO/SLOVENIA ESPERANTO-LIGO
Štefanova 9, 1000 LJUBLJANA

Ljubljana, la 5an de decembro 2014

# INVITO

Estimata!

Ni kore invitas vin al la renkontiĝo kun kultura kaj faka programo honore al la Semajno de homaj rajtoj kaj al la 155a datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof, kiu okazos

**sabate, la 13an de decembro 2014 je la 10a horo**

en la salono kaj la kunsidĉambro de la kvartalo Ljubljana Center, Štefanova 11, Ljubljana.

La programo de la aranĝo ampleksas la jenon:

La solena parto

1. Alparolo de la prezidanto de La Slovenia Esperanto–Ligo Janez Jug.
2. Aŭskultado de sonbendo de la parolado de Ivo Lapenna dum la ĝenerala asembleo de UNESCO en Montevideo en la jaro 1954.
3. Tomaž Longyka pri la graveco kaj sorto de la rezolucioj de UNESCO pri Esperanto.
4. Nika Rožej pri la laboro kaj atingoj de Sonja Tavčar (kun aktiva partopreno de la aŭskultantoj).
5. Anton Mihelič voĉlegos la rakonton de Reneja Mihelič *La malkontenta kato.*
6. Reneja Mihelič deklamos la poemon de Ivana Vatovec *Mi scias*.
7. Tomaž Longyka deklamos siajn du novajn esperantigojn el la poemaro de la slovena poeto Anton Aškerc.
8. Janez Zadravec voĉlegos sian esperantigon de unu el la rakontoj el la rakontaro *Butalci (Butalanoj)* de la slovena verkisto Fran Milčinski.

Societa parto:

a) Rebusoj kaj alispecaj enigmoj en Esperanto – kiu scipovas kaj kiom rapide?
b) Manĝetado.
c) Libera diskutado.
d) Vendo de libroj kaj poŝtmarkoj kaj enkasigo de membrokotizo.

Ĝis la revido salutas vin

prezidanto mag. Janez Jug